

# LEA/G - INFORMILO

(MAGAZINO)

Organ des Freien Esperanto-Bundes in deutschsprachigen Gebieten  
Libera Esperanto-Asocio en germanlingvaj regionoj

Fondita (gegründet) en 1956

Eldono nro.2

Aprilo 2003



*la mondo estas via!*

**Menschliches Verständnis für  
den Anderen, wenn eine gemein-  
same Sprache neben der  
Nationalsprache benutzt wird!**

Eldonanto - Herausgeber

Libera Esperanto-Asocio en germanlingv.regionoj

Freier Esperanto-Bund in deutschspr.Gebieten

Sekretario: Jiri Proskovec

Heimbastr.10, (DE) 44 143 Dortmund

Tel:0231/551211 - ePost:proskovec@yahoo.de -

Konto de LEA/G: PROSKOVEC, Jiri, 4907 260 00

Norisbank (BLZ 760 260 00)

Prizorganto de LEA/G-Infomilo: A.F.Stephan

Renchener Str.47, (DE) 77704 Oberkirch (Baden)

Tel-inkl.fakso: 07802/90336

Prizorganto por la interreta MAGAZINO:

Gary Mickle, Brüsseler Str.6, (DE) 13353 Berlin

GMICKLE@NEXGO.DE

LEA/G-Infomilo aperas minim. dufoje jare -

Abono per donaco de min. 10 €

Membreco en LEA/G: 8 € jare (inkl. liveradon de

la infomilo, servoj k.a.) - Regularoj haveblaj /

erhältlich ĉe A.F.Stephan

LEA/G-infomilo aperigas informojn pri LEA/G,

el la mondo de l'laboristaj esperantistoj

kaj pri ASLE, Vieno.

Varbas por AMIKECA RETO - Freundschaftsnetz

LEA/G estas membro de LEA-Komitato de SAT.

Pri la enhavo de sia teksto respondecas la en-

sendanto mem. La redakcio havas la rajton,

mallongigi tekston pro manko de spaco, aŭlkaj

ne akcepti ĝin.

## El la Redaktejo

Ne estis facila prepari tiun ĉi eldonon, ĉar diversaj malfacilaĵoj malhelpis la redaktanton. Li aĉetis tute novan komputilon (*Windows XP Home*) kaj ne zorgis, ĝustatempe registri la programon *word*, per kiu tajpi tekstojn en gazeta fasono estas pli taŭge praktikaj. La registriĝo estas ankoraŭ ebla per telefono aŭ per interreto. Telefone registriĝi ne estas facila metodo, mi intencas uzi ĝin, kiam mi havas trankvilan minuton.

Konsekvence mi devis tajpi per la programo *wordpad*. Ĉiu komputilisto scias, ke tiu programo ne estas komparebla kun *word*, ĉar simpla programo por tajpi leterojn ĝi estas.

Pardonu, kara leganto, eblan ne tro korektan aranĝon. Dankon!

Je via dispono A.F.Stephan

## Amo al Profesio

Mi estis lernanto en vilaĝa lernejo. Foje dum fizika leciono pri vapormaŝinoj la instruisto invitis lokomotivspertulon, kiu konkrete klarigu la vaporuzadon en lokomotivoj. Tio estis tre interesa por ni, ĉar la fervojlinio kaj la stacidomo de nia urbo ĵus situas proksime de nia lernejo. En tiu pasinta tempo oni uzis por lokomotivoj ŝtonkarbon.

Post la leciono la lokomotivisto klarigis detale la rolon de vaporo kaj, fine ni rajtis demandi tiun specialiston. Ankaŭ mi kuraĝis: "Oni opinias, ke fervojistoj okaze de illa profesio ĉiam estas malpura pro karbofulgo kaj mashingraso. Tio ja ne estas ĝusta. Vi estas vestata en bel-aspekta uniformo portante fervojistajn insignojn. Eble karbona fumo malplaĉas al vi. Ĉu vi ne timas difektigi vian pulmon, la koron? Vi ja devas spiri ĝin tage kaj nokte. Dum la deĵoro..."

La lokomotivspecialisto respondis:

"Kiel vi povas vidi mi estas plene sana. Karbona fumo kaj odoro estas tre agrablaj por mi. Ili ĝenas nur t.n. elegantajn virinetojn. Mi kutimigas al la odoro kaj eĉ kiam mi ne bezonas labori, mi promenas al la stacidomo por ĝui ĉi tiun odoron. Kvankam vi ankoraŭ estas infanoj, vi sciu ke, se homo amas sian profesion malagrablaĵojn tiu homo devas akcepti. Eble la plimulto el vi ne vidis lokomotivon en proksimo, nur aŭdas la fafilon.

Kiam vi vidos lokomotivon, en vi certe estos vekataj deziron estonte labori kiel lokomotivgvidanto. Estas granda plezuro senti kaj scii, ke la forto de la mashino dependas de via direktado kaj l'amo al la profesio. Oni preskaŭ flugas tra la kamparo, tra valoj inter altaj montoj. Al vi estas konscia, ke sur la kajo de la venonta stacidomo vin atendas senpacience vojaĝantoj."

Intertempe mi scias, ke neniu de la siatempaj lernejo-kolegoj lernis tiun profesion. La nuntempaj fervojistoj ne necesas karbon, sed elektrecon aŭ eble oleon. Mi ne dubas, ke ili same amas la profesion. (Ivan Tr.Minĉev, Bulgario)



**76-a SAT-Kongreso**  
 en La-Chaux-de-Fonds (Svislando)  
 12 - 19 Julio 2003

Detalaj informoj haveblaj ĉe  
 76-a SAT-Kongreso ĉe KCE  
 cp 311 CH-2301 La-Chaux-de-Fonds  
 Rete: <esperanto.kce@esperantio.net>  
 Telfakso: +41.32.9267407



**NOVA P.I.V.**

Lanĉoprezco :

(por Germanio)  
 70 € plus 7 € afr.reg.



Internacia  
 Kongreso  
 in Dresden  
 der Esperanto-  
 Freunde der  
 Eisenbahner  
 10.-16.05.2003

Karl Minor

**Deutsche Redensarten  
 in Esperanto**

(El germana-esperanta esprimaro laŭ la proverb-  
 aro esperanta de Dro. L.L.Zamenhof)

Ĉi tie nur kelkaj ekzemploj el la libreto  
 kiun Minor en la jaro 1921 sperte esper-  
 antiĝis. - Nur einige Beispiele!

*Abwarten und Tee trinken -  
 Ne diru 'hop' antaŭ la salto !*

*Das sind ja Ammenmärchen !  
 Tio ja estas fabeloj por infanoj !*

*Sicher wie das Amen in der Kirche !  
 Certaĝo kaj leĝo kiel 'amen' en preĝo*

*Er ist fuchstaufelswild !  
 Li estas kolera kiel cento da diabloj !*

*Ich wasche meine Hände in Unschuld !  
 Mi lavas al mi la manojn !*

*Das ist nicht der Mühe wert.  
 La tuta ludo ne valoras kandelon.*

(Eldonis Sarlanda Esperanto-Ligo - Artur E. Iltis)

**Esperanto kurz gefasst (2)**

**Das Geschlechtswort in Ein- und Mehr-**  
**zahl ist *la*. Das unbestimte fällt weg:**  
*la urbo - die Stadt, urbo - eine Stadt*  
 die Mehrzahlendung -j : *urboj - Städte*  
 auch beim Eigenschaftswort -aj : *bonaj*  
**Hauptwörter enden auf -o : *tago - Tag***  
**Eigenschaftswörter auf -a : *bona - gut***  
**Umstandswörter auf -e : *rapide - schnell***  
**Zeltwörter i.d.Nennform auf -i : *lerni***  
**Im 4.Fall wird ein -n angehängt.**

**Die vier Fälle:**

*der gute Vater - la bona patro*  
*des guten Vaters - de la bona patro*  
*dem guten Vater - al la bona patro*  
*den guten Vater - la bonan patron*  
*die guten Väter - la bonaj patroj (usw)*

## Stupoj de la vivo

La granda feliĉo esti malgrand'  
por homoj en infaneco ne komprenant'  
sed volas aĝi jam lom pli  
al deksep, dekok, sopiras li.

Kiam okdek jam opinias: Stop!  
En aĝo de 20 oni ja maljuna estas!  
Tiel aĝa mi ne restas!  
Ho, ve, kiam 30 al grizul' en galop'

Impresas la kvardeko lin,  
jam kvazaŭ de la vivo fin'.  
Sed kiam atingis kvindek li,  
forsovas li la finon pli.


Kiam sesdek jaroj, opinias li,  
mi estas juna eĉ se lom pli.

Kiam sepdek li esperos,  
ke Dio volas li okdek atingos.

Tuj post la okdek alvenos espero,  
atingi la naŭdek sur ĉi ti' bela tero.  
Sed ja ekzistas homoj kiuj aĝas pli,  
nun, kial ne aparteni tiam al ili?

Vere daŭras cento da  
vivjaroj nur malmultaj, ja,  
ĉar pli longa ol dek, mi pensas,  
kaŭzas la nul, kiu diferencas!

(Germanlingvan poemon de Alice Lindel tradukis  
libere M.Ratislavo k. Alberto Stefano)



1887 21 de Junio (malnova stilo) 21 de Majo : eceso de

## Kunlaboro

Kara leganto, ĉi tiun informilon taŭge formi estas mia deziro. La enhavo plaĉu al vi. Vi povas helpi per alsendo de materialo: tekstoj, fotoj, poemoj. La redakcio bonvolas ĉiun kontribuon, tamen rajtas mallongigi tekstojn, kiam la placo ne sufiĉas.

Kiam vi konstatas gramatikajn aŭ aliajn erarojn, ne hezitu skribi leteron al la redakcio. En la venonta eldono aperos via kontribuo resp. via konstato.

Jen la adreso por via alsendo:  
Libera Esperanto-Asocio p.a. A. Stephan  
Renchener Str.47, (DE) 77704 Oberkirch

## Milito ne estas solvo

Ĉiutempe ie iu homo opinias, ke la najbaro estas malbona homo, kiu aspirus domaĝi al li, kvankam oni ne estas certa pro tio. Egal', li uzas metodojn por deturni la supozitan danĝeron. Ŝtatgvidanto kaj/aŭ diktatoro komencas militon kaj deklaras, ke ĉi tiu milito estas grava por la libero, la popolo, la tuta mondo. Pro tio la (junaj) soldatoj devu batali kaj morti por la patrolando, por la homaro.

La prezidanto de la lando estas kontenta, ke la soldatoj estas *bravaj* (?); ke senkulpaj infanoj, virinoj, homoj mortas oni ja ne volas, estas milito!

La prezidanto/la diktatoro veturas al sia retirejon en la montaro.

Albert Stephas

## Kutimo

(de Josef Burger)

En la homa vivo ludas  
grandan rolon la kutimo !  
Tial saĝa homo konkiudas:  
'Estus tasko de l'reĝimo  
planti nur kutimojn bonajn  
en la koron de l'infano;  
ŝparus vortojn ni admonajn,  
- ĝojus ĉiu civitano !'

Zofia Banet-Fornalowa, profesia histori-  
istino, verkis i.a. libron pri

**Antoni Grabowski**  
eminenta Esperanto-aganto

Antoni Grabowski - homo, kiu apartenis  
al la unuaj talentoj kiuj fundamentis la  
Esperanto-kulturon, estas preskaŭ eks-  
kluzive konata kiel "Patro de Esperanto-  
poezio".

Veras ke lia talento pleje evidentiĝis en  
tiu branĉo de Esperanta kulturo. Tamen  
Grabowski ne limiĝis al la literatura verk-  
ado. Li estis profunde engaĝita en polan,  
kaj internacian Esperanto-movadon agan-  
te fruktodone diverskampe.

La aŭtorino de ĉi-libro celas evidenti-  
lian aktivadon ĝis nun ne sufiĉe bone ko-  
natan.

En biografio de Antoni Grabowski, kiel  
okazas kutime pri homoj eminentaj, oni  
trovas fojfoje informojn ne sufiĉe precis-  
ajn. La aŭtorino i.a. rilatas al ili plene  
konvikita, ke provo ĝustigi nenion for-  
prenas de lia eminenteco, granda estimo  
kaj sato, kiun li merite ĝuis en Esperanto-  
komunumo.

Li restas por ĉiam sur Verda Parnaso.

La 4an de julio 2001 pasis 80 jaroj de  
morto de Antoni Grabowski.

La celo de tiu libro estas proksimigi lin  
al la legantoj kaj tiamaniere digne omaĝi.

\*\*\*\*

Manfred Retzlaff tradukis kanton de la  
konata poeto Wolf Biermann. Ĉi vere est-  
as aktuala pro la milito en Irako.

Soldat', soldat' en griza norm',  
soldat', soldat' en uniform'.

Soldat', soldat', tro multas vi,  
ne estas ludo tiu ĉi !

Soldat', soldat' ne vidas mi  
vian vizaĝon tie-ĉi.

Aspektas egal' soldat' al soldat',  
ĉu kiel mortinto ĉu en vivad'.

Soldat' soldat' al kiu fin'

soldat', soldat' tio gvidos nin !

Soldat', soldat', en venonta milit-detru',  
soldat', soldat' ne venko plu !

Soldato, soldat', tre juna nia mond'  
soldato, soldat', sam' kiel vi !

La mondo havas profundan fend',  
apud la rando staras vi !

\*\*\*\*\*

### Evento el la infaneco

Iutage najbara amiko kaj mi - ni estis  
eble ses aŭ sep jaroj - ripetade rakon-  
tis unu al la alia pri la imago povi flugi  
kiel birdoj. Finfine ni ne nur volis  
babili pri tio, sed efektiviĝi la flugadon.

En la korto de nia najbaro ni trovis  
trunkegon de arbo. Tiutempe multaj  
enloĝantoj de nia vilaĝo ne iris en le-  
do-suojn, sed en tiaj el ligno, kiuj estis  
faritaj en speciala fabriko.

Dum nia religi-instruado en la lernejo  
kaj de niaj gepatroj ni lernis preĝi al  
Dio kaj peti lin plenumi dezirojn. Nu, ja  
ni petis la Dion helpi nin al flugo.

Post kelkaj preĝadoj ni forlasis la  
ĉamburon enkiu ni ne-ĝenate povis pre-  
ĝi, kaj ĉiam denove saltis super la  
arbotrunko. Poste ni pripaltis niajn rip-  
ojn en la espero trovi tie flugilojn por  
uzi ilin flugi super la trunko. Nenio ok-  
azis !

Fine ni seniluziĝis opiniinte, ke Dio  
eble ne povus plenumi nian deziron kaj  
intencas, ne denove preĝi por tio.

Tiamaniere efektive - aŭ bedaŭrinde -  
finis la unua kaj granda aventuro en nia  
vivo. Alvenis en niaj kapoj la kompreno,  
ke oni sen io ĉu tekniko ĉu spertoj kaj  
per preĝoj ne povas perfektivi ion.

Jozef Fischer

\*\*\*\*\*



LEA/G - Informilo  
bondeziras al vi  
gajajn paskotagojn !

paĝoj de la Aŭstria Socialista Ligo Esperantista (ASLE)



Karaj gelegantoj, karaj membroj de ASLE !

La LEAG-Magazino ne plu ekzistas. Ĝi estis anstataŭata per la jena LEAG-  
Informilo. Ne ŝanĝiĝis nia organo, La Socialisto. La Aŭstria Socialista Ligo  
Esperantista plu informos vin pri niaj laboro kaj aranĝoj. Ankaŭ ni daŭre informos  
vin pri la eventoj de la laborista movado en Aŭstrio.

Bonvolu ankaŭ estonte gardu vian fidelecon je ASLE kaj skribu al ni viajn  
demandojn aŭ sugestojn pri la enhavo de La Socialisto al nia adreso:

**Aŭstria Socialista Ligo Esperantista**  
**Paulinengasse 13**  
**A-1180 Wien.**

Nia kasisto kuraĝas 'ĝeni' vin per ĝentila peto:

Se vi ankoraŭ ne pagis vian membrotizon por la jaro 2003, bonvolu pagi ĝin al  
nia konto n-ro 241 22 63 je PSK (Österreichische Postsparkasse).  
Niajn karajn membrojn, kiuj donas donacojn al ni, ni mencias nome en la venonta  
numero de La Socialisto.

Dankon pro via atento!

**La estraro de ASLE**

**ASLE povas disponi pri du paĝoj. Kiam restas spaco, ĉar ASLE pro iaj kaŭzoj ne povas  
liveri sufiĉe da materialo, la asocio en Vieno bv. permesi, ke la redakcio uzos ĉi tiun  
spacon por aliaj tekstoj. Dankon! - Tio signifas, ke ASLE povas demandi pri pluan spacon,  
kiam niaj geamikoj bezonas ĝin. Por la eldonanto: A.F.Stephan**

### Amikeca Reto

estas neprofitcela asocio por ebligi al esperantistoj kontakti kun samideanoj trans la  
limoj, uzadi la internacia lingvo Esperanto, informi pri vojaĝoj k.a.

A la aranĝoj de la Amikeca Reto oni povas partopreni per membreco. A.R. disdonas  
adresaron pri 145 paĝojn. Ĝi enhavas pli ol 600 nomojn kaj adresojn de esperantistoj  
en la tuta mondo. Estas montrataj detaloj pri vizitoj, aktivecoj, hobiaj, diskut-temoj kaj  
aliaj interesoj. La membreco inkludas aperigi proprajn indikojn.

Detaloj riceveblaj ĉe Franz KNÖFERL, Ritter-Gerold-Str.28, DE-85302 Geroldbach

Tel: 08 445/1350, franz.knoeferl@Pfaffenhofen.de

(aŭ) A.F.Stephan, Renschener Str.47, DE-77704 Oberkirch (Baden)

## Am 1. Mai wieder mit den Sozialistischen Esperantisten auf der Wiener Ringstraße!



Wir treffen uns um 8:30 Uhr am üblichen Treffpunkt

Ecke Babenbergerstraße/Ring

Bitte kommen Sie zahlreich! Wir wollen den Leuten zeigen, dass Esperantisten auch gesellschaftlich aktiv sind!

### **Wiener Spezialitäten (1)**

**Heuriger Weinbauernlokal** in dem der sogenannte 'resche' Wein ausgeschrieben wird. Diese Lokale sind gekennzeichnet per Föhrenzweige.

**Heurigenmusik** entstanden aus den Weisen des 'Bratigeigers' (Schrammelmusik gespielt mit Geige, Gitarre und Harmonika).

**Sachertorte** 1832 zum ersten Mal vom Koch des Fürsten Metternich Franz Sacher gebacken (aus Eigelb, geschmolzener Schokolade, wenig Mehl, Zucker und geschlagenem Eiweiss, mit Marillen-Marmelade bedeckt und mit Schokoladenglasur überzogen; bleibt wochenlang frisch.

(esperantiĝis A.F. Stephan)

### **Specialaĵoj de Viena (1)**

**Heuriger Vinrestoracio** en kiu oni trinkas la t.n. vinon de la jaro. Tiuj vinejoj estas ornamataj per pinobranĉoj.

**Muziko en tiuj vinejoj** venas de specialaj muzikoj de la t.n. 'Bratigeiger' (Schrammelmuziko ludata per violono, gitaro kaj harmoniko).

**Sacher-torto** estas bakita la unua fojo 1832 de Franz Sacher, kuiristo ĉe la princo Metternich. (Ĝi enhavas ovoflavon, fanditan ĉokoladon, iom da faruno, sukero k. frap. ovobiankon, kovrita per marmelado el abrikotoj kaj glazuro el ĉokolado. Ĝi estas manĝebla dum multaj semajnoj.



Nazi-kulturo 1933 (kiam la Laborista Esperanto-Asocio estis malpermesata)

- Elĉirajo el priskribo de Bruno Siegert (1893-1973) -

Schweidnitz distrikto Breslaŭ jam delonge famiĝis kiel loko de reakcio kaj naziismo. Estis ofte ĉifite Hitler por paroli al la popolo. Ne nur politikaj sed ankaŭ kulturaj organizoj estis kontraŭbatalataj, kalumniataj kaj minacataj. Post la tielnomata "potencakiro" en januaro 1933 la nazi-teroro brutaliĝis, pliiĝis arestadoj, domtraserĉoj, juĝdebatoj en partitribunaloj, deportadoj ktp. Ankaŭ la lokaj grupoj de Germana Laborista Esperanto-Asocio kaj SAT estis same malamataj, persekutataj kaj malfondataj kiel antifashistaj unuigoj. - En la nokto de la 9-a al la 10-a de aprilo 1933 mi estis eltrovita de serĉ-taĉmento en la loĝejo de mia patrino. Minecata per pistolo mi estis transportata en malgranda aŭto al la Societa Domo en antaŭloko de Kroischwitz, kiu estis Nazi-gastejo. Dum tri tagoj tie okazis pridemandoj. Oni irigis min en la grandan dansalonon, kie de post kelkaj horoj jam troviĝis 60 - 70 teror-viktimoj. Gardistoj - SS- kaj SA-viroj - kun pistoloj kaj karabenoj iom post iom uzis kaŭĉukajn bastonojn kaj pafilustojn por bati. Iu viktimo provis trafranĉi siajn arteriojn per razklingo. En angulo sur la planko estis amaso da haroj, kiujn oni estis fortondintaj de la viktimoj.

Post trihora atendado kaj pridemandado oni veniĝis min en la bilardĉambron. Tie estis 20 - 25 personoj: SS, SA, kriminalkomisaroj, policistoj kaj "batistoj". Pistoloj, kaŭĉuk-bastonoj, bier- kaj konjakglasoj estis la dekoracio de la grandparte ebrietaj "popoljuĝistoj". Mi diris "Bonan vesperon!" Nun la procedo komenciĝis.

"Ha, vi malbenita porko, vi ne diris 'Heil Hitler'. Kiel nomiĝas la germana saluto? Eliru vi ruĝa porko kaj revenu salutante korekte."

Bato per karabeno, mi reeniris kaj murmuris ion, kio sonis iomete kiel la dezirita saluto. La unua akto estis pasinta. Post dudek minutojn mi denove estis pridemandata laŭ jena maniero: Ĉe ĉiu demando oni batis min.

"Vi ruĝa porko kontraŭbatalis dum 20 jaroj nin kaj Grand-Germanion spionadante per via Esperanto-afero. Kontaktoj kun komunistoj en la tuta mondo!"

Fine mi estis transportita al koncentrejo. Felice mi travivis la teroron.

\*\*\*\*\*

Ĉi-sube ekzemplo de Reisescheck (vojaĝĉeko) parte en Esperanto, kiun eldonis 1927 la Gelderbloms-Mondmigro-movado. La unu \$ valoras 25 € kaj estis ofertata dum aŭkcio septembro 2002 ĉe Cortie en Hamburgo.

(Aisendis J. Jankowski, Dortmund)

